

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 48, Februaro 2022



*La placo de Gustavo II Adolfo.*

Magazino por kulturo kaj plezuro

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

# Enhavo

Enhavo.....	2	La Sveda Placo en Vieno .....	18
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Letero de la aŭstro, Walter Klag, leginte artikolon el "Die Presse" pri koronaj strategioj, i.a. en Svedio.....	19
Espeporko meditas.....	3	Tial germanlingva aŭstro legas librojn en la sveda lingvo.....	23
El la ceremonio de la funebra servo por Britta Rehm 17 januaro en la kapelo de Sankta Luko, Gotenburgo.....	4	Esperanto en Herzberg havas longan tradicion.....	24
La memortago de la ekstermado .....	6	La Esperanto-biblioteko en Herzberg .....	26
UEA, Universala Esperanto-Asocio informas .6		La 8a Afrika kongreso de UEA.....	27
Ruĝa brasiko – vera artaĵo.....	7	Okapio, stranga mamulo de tropikaj arbaroj centre de Afriko.....	27
La rubena najtingalo estis savita de du pigoj.7		Ann Westermark gvidas skribokurson en Matemwe, Zanzibar North, Tanzanio .....	29
Ĉio estas amo .....	8	Pri sveda poemkonkurso .....	30
La kardelo kantas en vintro... ..	8	"La 16 reguloj" kaj la pentristo Carl Larsson	32
Kio okazas en la cerbo de Karlo?.....	9	ESPERO, germana entrepreno, kiu apogas kaj la protekton de minacataj bestoj kaj Esperanto.....	32
Kuiristoj .....	11	Bildo kaj filmo pri Marjorie Boulton .....	34
La tagon de vegetarismo oni festas la 1:an de februaro.....	13	"Sur bluaj planedoj" eldoniĝis en 2021 .....	35
Ĉu la anglaparolantoj fariĝas viktimoj de la disvastiĝo de sia lingvo? .....	14	Troviĝas multaj esperantaj gazetoj en la mondo.....	35
La angla estas ja dise parolata .....	15	Someroj ĉe Sten Svenonius en Kvarnabo ....	36
La 6:a de februaro estas la samea nacia tago.....	15		
Mapo pri koloniistoj kaj kolonioj dum jarcentoj .....	16		
Svenska kolonier – Svedaj kolonioj.....	16		

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@gmail.com](mailto:ingegerd.granat@gmail.com). Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato.





## Espeporoko meditas



- ☆ La 17an de januaro okazis **la funebra servo de Britta Rehm**, tre solena kaj bela servo!
- ☆ En ĉi tiu numero **germandevenaj artikoloj multas**. En Vieno troviĝas Schwedenplatz kaj en Herzberg oni vere uzas Esperanton.
- ☆ **Francoj trovas svedan arton valora**, kiam ili uzas bildojn de la sveda pentristo Carl Larsson por ilustru lernolibreton pri la "16 gramatikaj reguloj de Esperanto".
- ☆ Ĉu **angloj** povas senti, ke ne estas nur avantaĝoj lige kun la **disvastiĝo de la angla**? Laŭ Riksablo, certe!
- ☆ **Josef Kříž de Ĉeĥio** aldonas **gazeton el Japanio**. Do, Ora Ĵurnalo havas ankoraŭ unu kolegon!
- ☆ Multaj svedoj spektas la TV-programon "På spåret" (sur la trakoj) vendredajn vesperojn. Fine de januaro unu vojaĝo iris al Afriko. Unu el la demandoj al la konkursantoj temis pri tre malofta afrika besto, kies kapo similas al ĝirafino kaj kies postaĵo similas al zebro. Estis novaĵo por mi. Nun **Espoir Kasati, loĝanta en Kongo, rakontas pri la okapio**.
- ☆ La uzo de **Zoom** kaj aliaj retaj komunikiloj kreskis. Ekz. vi povas ĉeesti la **8an Afrikan kongreson de UEA**. De Gotenburgo ekis **Zoom-kurso** por komencantoj, progresantoj kaj "spertuloj", kies sola manko estas ke ili ne multe parolas Esperante.
- ☆ Leginte **la rakonton pri Karlo, fare de Raita Pyhälä**, ni verŝajne rekonas la problemojn pri personoj, kies cerboj pli kaj pli ŝanĝiĝas pro demenco. Tiu malsano ja ankaŭ multe influas familianojn.
- ☆ Ora Ĵurnalo ja ne estas komerca magazino. Ĝi estas senkosta ĉar ĉiuj laboras senpage. Tamen ni enmetas artikolon pri "**Espero,**" **germana firmao**, kiu celas kaj disvastigi Esperanton kaj protekti bestojn kiuj riskas esti ekstermitaj.
- ☆ "**Sur bluaj planedoj**" de **Laure Patas d'Illiers** aperis aŭtune 2021. Ĝi estas unu el la kandidatoj al nia nova **zoom:a Librorondo**, kiu komenciĝos fine de aprilo.
- ☆ Nova serio fare de Ingegerd pri **gotenburgaj kuiristoj** komenciĝas. Ili ĉiuj estas kolorriĉaj kaj bone konataj en la urbo. Por kompletigi la bildon, mi serĉas kuiriston, kiu nur kuiras vegetare. Kie ri troviĝas?
- ☆ Troviĝas someraj memoroj, kiam la klubanoj jaron post jaro iris al Kvarnabo, ĉe la lago Anten, ĉirkaŭ 60 km for de Gotenburgo, **por viziti Sten Svenonius** en lia somerdomo. En la proksimeco oni povas iri per ĉarma malnovstila trajno al ruino de kastelo, kiu laŭ sorĉo forbruliĝas ĉiun centan jaron. Post la tria bruliĝo ĝi nun restas ruino, kie oni somere havas ekspoziciojn kaj turnirojn.
- ☆ Kia estos la somero 2022? Ĉu ni denove povus havi **someran kurson**? Ni vidu!  
/Siv

## El la ceremonio de la funebra servo por Britta Rehm 17 januaro en la kapelo de Sankta Luko, Gotenburgo



Ĉirkaŭ 25 personoj ĉeestis, malgraŭ ke Britta ne havis multajn parencojn. La kapelo estis hela, la suno brilis kaj ĉiuj kunkantis en la himnoj.

Geamikoj kaj reprezentantoj de societoj, en kiuj Britta membris, iris al la absido, kie troviĝis foto de Britta. Ili dankis ŝin pro ŝia agado en la resp. societo – kompreneble ankaŭ ni dankis ŝin.



Venis floroj de KELI.



Sur nia bukedo estas skribite: "Vi minns dig med stor glädje! Göteborgs Esperantoförening." (Ni memoras vin kun granda ĝojo! La Esperanto-Societo de Gotenburgo.)



Rimarku la maskon! Estas ja ankoraŭ koronatempoj.

Post la ceremonio staras Margareta, Anita, Andreas, Ingegerd kaj mi ekster la kapelo. Eĉ se funebra servo ofte estas malĝoja kaj melankolia afero, ĝi tute ne estis tia dum la servo de Britta.

Mi imagas ke ŝi staras kun ni en la sunbrilo, ridante, portante sian blankan mansakon kaj rakontante gajan historion.

Fartu bone, Britta, en via nova mondo! /Siv



# La memortago de la ekstermado

Neniam plu!!

Ne lasu la flamon de paco estingiĝi!



*El la "Forumo por vivanta historio":*

La 27-an de januaro homoj en la tuta mondo kunvenas en ĉiujara evento. Ĝi estas la Internacia Tago de Memoro por la Viktimoj de la Holokaŭsto – la sama dato kiam la Holokaŭsta koncentrejo Auschwitz-Birkenau estis liberigita en 1945. En 2022, tio signifas antaŭ 77 jaroj.

Ekde 2001, ĝi estas nacia memortago. En 2005, UN deklaris ĉi tiun tagon Internacia

Tago de Memoro. Estas tago, kiam ni honoras la memoron de ĉiuj murditoj dum la holokaŭsto kaj de tiuj, kiuj rezistis. Tago por ĉiuj, kiuj volas esprimi sian subtenon por la egalvaloro de ĉiuj homoj.

Lige kun Holokaŭsta Memortago, manifestacioj, seminarioj kaj edukaj projektoj estas aranĝitaj en multaj lokoj ĉirkaŭe en Svedio.

## UEA, Universala Esperanto-Asocio informas

La komitato baldaŭ decidus pri vendo de la nuna oficeja domo de UEA. Konservante la decidon al la Komitato, UEA malfermas la debaton ankaŭ al sia membraro.

Resumo aperis en la Forumo de UEA kaj en la diskutlisto UEA-membroj, vidu la ligilojn sube.

*Torben Svendsen, Danio, atentigis nin.  
Dankon!*

<https://forumo.uea.org/temo/173-%C4%89u-vendo-de-la-nuna-oficeja-domo/>

<https://groups.io/g/uea-membroj/topics>

Vidu ankaŭ: <https://www.liberafolio.org/2022/02/07/la-komitato-decidis-pri-la-vendo-de-la-co/>



# Ruĝa brasiko – vera artaĵo

La ruĝa brasikokapo estas la monata artaĵo. Vidu ĉirkaŭe, artaĵo troviĝas ĉie!  
/Ingegerd



## La rubena najtingalo estis savita de du pigoj Rubinnäktergalen räddades av två skator

*Laŭ Göteborgsposten, la rara birdo ne havas tiel grandan ŝancon pluvivi ĉi tie.*



Jan Hellström rakontas:

La rubena najtingalo, kiu altiris multajn birdrigardantojn al Vargön ekde novembro, estis lastatempe atakita de kato laŭ artikolo hodiaŭ en la ĵurnalo TTELA. La kato havis ĝin en siaj ungegoj. Tiam venis du pigoj kaj komencis ataki kaj inciteti la katon, do ĝi liberigis la birdon. Ĉi tio laŭ TTELA.


Jan Hellstrom berättar:

Rubinnäktergalen, som lockat många fågelskådare till Vargön sedan i november attackerades nyligen av en katt enl en artikel idag i tidningen TTELA. Katten hade den i sina klor. Då kom två skator och började attackera och retas med katten, så den släppte fågeln. Detta enligt TTELA.



# Ĉio estas amo

Torben Svendsen sendis la jenan kanton en esperanto, kaj kun angla subteksto: <https://youtu.be/09Pp-2uCogE>



Vi nur posedas vin mem  
Mi nur posedas min mem  
Tamen – la mondo estas amo  
Ŝi posedas nur sin mem  
Li posedas nur sin mem  
Ĉio – la mondo estas por ĉiuj

Nenio en la mondo  
Valoras pli ol amo  
Nenio en la mondo  
Kiel la ridanta infano

Kio vivas en mi  
Kion mi vidas en vi  
Estas la bela vivo  
Ĉio estas amo

La birdo kaj la kanto  
Odoro de la floro  
Ĉio – kio spiras  
Volas resti en paco

Nenio en la mondo  
Valoras pli ol amo  
Nenio en la mondo  
Kiel la ridanta infano

*Banjo Esperanto*

[www.armelamiot.com](http://www.armelamiot.com)

## La kardelo kantas en vintro ...

Jen vidu – neĝas, jen vidu – neĝas  
Tre amuze ha, ha!  
Ho, nun ja vintras, ho, nun ja vintras  
en mia koro, Hura!  
Do, prenu sledojn eksteren kaj gantojn  
surmanen  
Kaj subeniru deklivon,  
Ho, bona vojaĝ'!







La rubekolo demandas al la kardelo:  
– Kiel vi meritis viajn multkolorajn plumojn?

**Bildoj de Renate Säfström**  
[www.fotoforlivet.com](http://www.fotoforlivet.com)

## Kio okazas en la cerbo de Karlo?

De Raita Pyhälä

Ne nur unu fojon sed ripete. Anna ne povas kompreni. Tio iom timigas ŝin. Kaj Karlo mem ne agnoskas. Li volas vivi kiel antaŭe.

Sur la tegmento de la domo al la riparisto mankas ripariloj, kiujn Karlo trovas en la garaĝo, sed li ne povas tien iri. Li ne povas vidi, kie ĝi estas, kaj li hezitas. Anna mem iras por la iloj, kaj kiam ŝi revenas, Karlo diras, ke en lia kapo vidiĝis tute aliaj garaĝo kaj korto konataj de li en la infanaĝo.

Alian tagon, kiam Karlo devus atendi Annan ĉe la stacidomo kaj preni ŝin hejmen, kiam ŝi revenas de la ĉefurbo, Anna ne vidas lin aŭ lian aŭton ie. Busoj ne plu trafikas al ilia izolita vilaĝo. La loĝantaro draste malpliĝis. Ĉu ŝi prenu taksion por la sesdek kilometra distanco aŭ plu atendu la edzon? Ŝi decidas telefoni. Karlo pardonpetas, ke li forgesis la rendezuon, kaj trankviligas Annan, ke li aperos ĉe la stacio en unu horo.



Revenvoje ili gaje interparolas pri ĉiutagaĵoj kaj Karlo zumas rusajn romanojn, ankaŭ kantas france kaj ruse ĉiujn kanzonojn, kiuj kunigas ilin. Dum la kvardek jaroj de kuna vivo ili ĝuis muzikon, kanzonojn kaj kantojn, similaj fakoj en la laborvivo. Tri infanoj, samopiniado pri gravaj decidoj en la vivo veldis kaj forĝis ilin en unun. Tamen tio ankaŭ rigidigis ilian rilaton. Anna sentas, ke io ŝanĝiĝos kaj ne en bonan direkton.

En Universala Esperanto Kongreso eksterlande Karlo forgesas la koncerton, kiun ili ambaŭ volis aŭskulti. Anna sidas tie jam, rezervis seĝon por li, ŝi oftege turnas sian kapon al la enirejo, sed li ne aperas. Post la fino de la koncerto li telefonas, ke li ne trovis la koncertejon kaj li bezonas Annan por trovi la vojon de la bierejo al la studenta loĝejo, kie ili tranoktas. Anna kontraŭvole decidas renonci al la malfruvesperaj programoj, ŝi ne kuraĝas lasi Karlon promeni sola, ĉar li povus perdiĝi en la malhelaj stratoj. En la vestiblo de la studenthejmo afable salutas ilin la gardistino, kiu jam konas ilin, ĉar Karlo ĉarmis ŝin per siaj komplimentoj kaj ŝercoj. Anna eĉ fotis tiujn du, kiuj pozis por ŝi, amikece brakumante unu la alian kaj kun rideto sur la lipoj.

Post la UK Karlo per sia aŭto tute sekure veturigas Annan kaj sin mem de la flughaveno al la hejmvilaĝo, sed Anna devas atentigi lin pri la turniĝoj kaj vojkruciĝoj. Ŝajnas ke li ne vidas ilin, eĉ la kruĉiĝon, kie ili centfoje turniĝis por viziti siajn geamikojn kaj lian kolegon. Hejme kelkfoje okazas, ke Karlo ne memoras, ĉu jam okazis la tagmanĝo aŭ ne. Li ne ĉiam trovas sian propran necesejon. Dum vizitoj kaj tranoktoj en fremdaj ĉambroj Anna devas atenti, ke li ne pisas en florpoton aŭ netaŭgan angulon. Anna demandas sin, ĉu li duondormas aŭ somnambulas. Ĉe virina gastiganto okazas, ke li obstine volas eniri ŝian dormoĉambron anstataŭ ol reveni en la liton apud Anna. Fine Anna kaj la gastigantino ride devigas lin elekti la ĝustan pordon. Dumtage ĉio iras kiel antaŭe. Karlo ne memoras sian noktan eraron, li senĉese rakontas siajn plej bonajn historiojn kaj sukcesas amuzi kaj interesi ĉiujn ĉeestantojn. Krome, li helpas la dommastrinon pri la plej pezaj laboroj. Mallonge dirite, li kutime kapablas ĉarmi kiun ajn kompanion.

Anna fariĝas singarda kaj suspektema. Post ripetaj malorientiĝoj de Karlo sur la kutimaj itineroj, ŝi ekdemandas sin, ĉu Karlo daŭre

havas la rajton posedi sian licencon. Ĉu ŝi sciigu la policon? Ĉu ŝi respondecos, se okazos akcidento? La aŭto estas nemalhavebla, la distancoj al kuracisto, dentisto, trajnoj, flughavenoj longas sesdek kilometrojn aŭ pli. Anna ne havas la licencon. Kiel stulte, ke ŝi ne akiris ĝin kiam juna. Sed ŝi tiam estis tro ŝparema kaj pensis, ke sufiĉas ke unu en la familio stiras. Publika trafiko tamen ne plu ekzistas. Krome, Karlo neniam pardonus ŝin, se li perdus sian konduklicencon.

Anna petegas Karlon, ke li testigu sian memorkapablon en la plej proksima urbo. Longe ŝi petadas antaŭ ol li konsentas, kvankam kontraŭvole. Post la ekzamena intervjuo, kiun Anna ne rajtis partopreni aŭ aŭdi, Karlo eliras tre kontanta pri si. "Ho kiel ili miris ke MI devas esti ekzamenata. Mi ja estas tute sana. Estis nur unu aŭ du demandoj, al kiuj mi ne volis respondi."

Neŭrologo vokas por inviti Karlon al plia ekzameno. Karlo koleriĝas kaj rifuzas eĉ interparoli kun la telefonanto. Anna devas pardonpeti pro lia konduto. La neŭrologo ne retelefonas. La vivo daŭras, ne malagrabla. Okazas pluraj belaj kaj feliĉaj tagoj. Alvenas aŭtuno, la koloroj de la naturo ekflamas. En sunaj tagoj Anna kaj Karlo rastas la falintajn foliojn de aceroj kaj betuloj por porti al la kompoŝto. La ĉielo mirinde bluas, same la apuda lagego, kies insuloj speguliĝas orange kaj flave en la senonda bluega akvo. Lun tagon Karlo laciĝas pli ol en la antaŭaj, li diras, ke li volas ne rasti en la sekva tago. Eĉ la bona tagmanĝo kaj la ŝatata franca kafo ne vigligas lin. Anna ne scias kiel helpi. Feliĉe en ilian korton turniĝas ruĝa nekonata Fiat. Ili ambaŭ scivolemas, kiu elaŭtiĝos. Evidentiĝas ke tio estas Esperanta gasto volonta surprizi ilin per ne-antaŭ-anoncita vizito.

Vespere Karlo hejtas la saŭnon, li ja volas, ke la fremdlandano konatiĝu kun la finna saŭno. Nenio amikigas pli ol sinbanado en la saŭno,

kie ĉiu homo estas nur sia nuda memo. Post la saŭnumado Karlo kaj la gasto diskutas germane kaj Esperante. Karlo proponas bierumadon kaj rostadon de kolbasetoj ĉe la senpordeta fajrejo. Ankaŭ tio ja estas finna kutimo en saŭnovesperoj. Ĝis malfrua horo la du viroj interparolas pri seriozaj kaj ŝercaj temoj ĝis natura laciĝo kaj la bonnoktaj salutoj.

Je la dua horo nokte Anna vekigigas pro laŭta kriego. Ŝaltinte lumon ŝi vidas ke Karlo sidas kun pugnigitaj manoj en la lito, kriegas. Ŝajnas, ke li dormas, li ne malfermas la okulojn. Anna supozas, ke li suferas de koŝmaroj. Ŝi frapetas liajn vangojn, parolas al li tenere, provas veki lin. La pugnoj

malfermiĝas kaj li refalas sur la matracon. Silentas....Ĉu ĉio en ordo do?...Kial li ne respondas?...Kial li ne malfermas la okulojn?...Ĉu li spiras?...Anna metas sian orelon sur la bruston de Karlo.

Ne. Karlo ne plu spiras!

La ambulancoj diras, ke ili nenion povis fari. Ili nur telefonos por alia aŭto por forporti la mortinton. Anna demandas, ĉu ŝi antaŭ tio rajtas adiaŭi la homon, kun kiu ŝi vivis kvardek jarojn. Ŝi genuiĝas apud Karlo sur la planko. Kion ŝi diras al li, tion neniu aŭdis kaj ŝi mem ne plu memoras.

/ Raita Pyhälä

## Kuiristoj

### ”Tro da kuiristoj kaĉon difektas”

de Ingegerd

Svedio estas ”manĝolando!” de nordo ĝis sudo. Mi volas diri tion kun decidemo.

Multaj famaj manĝejoj kun famaj kuiristoj, ĉiu kun siaj propraj specialaĵoj.

Aparte en Gotenburgo:

”**Kometen**” estas vere kultura restoracio, kiu funkcias ankoraŭ hodiaŭ.

”**Sjömagasinet**” en Klippan estas alia loko kaj estas multaj, multaj pli.


Mi intencas fari serion pri kuiristoj. En ĉi tiu serio, mi volas paroli pri kuiristoj, kiuj povas esti ligitaj al eventoj, televidaj programoj kaj simile. Tri personecoj en ĉiu numero, kelkfoje en la estonteco.

Vidu ilin kiel inspiron por via propra kuirado.



”Hemse-Nisse” en Gotlando kun edzino.





## Kapitano Mangô, "Kapten Mat"

Kio estus pli bona maniero ol komenci la serion per "Kapten Mat" ĉe patego freneza (vidu la bildon).

Li kutime esprimas sin eŭforie pri stari ekstere kaj kuiri. Plejparte li pravus, sed li ankaŭ staris en pluvego kaj luktis kun sia vespermanĝo. La bela marjako, ĉu ĝi povas defendi sin kontraŭ ĉiuj oleoj kaj grasoj, kiuj spicas viandan manĝon?

Parolante pri spicoj, li havas specialajn spicojn, pri kiuj li reklamas. Fumaĵita paprika pulvoro supozeble estas la donaco de Dio al la homaro!

Multaj estas tiuj, kiuj maltrankviliĝis pri la alkoholkutimoj de la Kapitano, sed koncerne tiun zorgon, la kapitano metis fuman nebulon sur sian paton kaj sabris ĉampanon kiel neniam antaŭe. Bonaj vinoj ankaŭ estas inkluzivitaj apud la bongusta manĝaĵo, kiun kapitano Mat kuiras en la vaporoj super sia granda pato ekstere.


Sed, estas fakte la manĝaĵo, kiu estas enfokusigita, tie malsupre ĉe la lago kaj ĉe la pato.

Kiam finfine ĉio estas kuirita kaj gustumita, la kapitano eksplodas per volupta Mmmmmmm... Ĉi tio estas vere bona! Mmmmm... dum la fotantino kaj la kato Mat rondiras kun la "avar-akvo" (salivo) fluanta en riveretoj el la lipanguloj.

## Per Morberg

Kio estos por manĝaĵo?

Estas Per Morberg kiu faras tiun demandon al si en la televida programo "Kio estos por manĝaĵo?" La sovaĝa kaj esprimplena kuiristo Moberg detruas la kuirejon kvazaŭ li estus la asa dio Toro, kiu estas ekstere en la plej furioza ŝtormo. Patoj kaj aliaj iloj ekfulmas kaj tondras kune kun poreoj, mituloj, omaroj kaj duona apro kaj alko, kiujn Morberg mem pafis kun granda braveco... Paf! Eble estas tute prave, ke li ekludas "aĉajn" rolojn en la teatraĵoj kaj televidserioj, en kiuj li partoprenas kiel aktoro. Kiu ne pensas pri Obeliks, amiko de Asteriks, kiam vi spektas la programon "Kio estos por manĝaĵo" sur televido?



## Ulf Wagner

aŭ "Sinjoro Michelin-stelo mem" en Göteborg.

Nu, tio efektive estas vera. En 1989, li estis la unua Gotenburgo-kuiristo kiu ricevis stelon

en la Michelin Guide. Tiam li prizorgis la restoracion "The Place".

Li ankaŭ estis restoraciestro ĉe "Sjömagasinet" en la distrikto Klippan kie li

laboris kun kuiristo Mannerström. Hodiaŭ li estas 66-jara, kaj post la vendo de Sjömagasinet, li malfermis la gastejon "Wagners" kun delikata menuo. Eble ĝi estas omarsalato aŭ bova fileta karpaĵo, kiu scias.

Se vi volas rigardi, vi devas iri al strato Östra Larmgatan 18 en Gotenburgo. La plej amuza memoro, kiun mi havas pri Ulf Wagner, estis lia memoro en la televida programo "Steloj ĉe la Kastelo", dum la epizodo kun Kjell Bergqvist, kie Bergqvist mendis frititan falu-kolbason kun terpomkaĉo kaj mirteloj... Mi promesas, se Ulf Wagner estus ekskuracisto, Kjell

Bergqvist estus transdonita al "frenezulejo en forta frenezjako". Tamen, li povis kuirigi multajn pladojn en kasteloj dum la serio, do kompreneble li povis fari la tagon de Kjell Bergqvist kun falu-kolbaso ...




## La tagon de vegetarismo oni festas la 1:an de februaro

Miaj gepatroj estis vegetaranoj. Tiutempe oni ne trovis tiom da vegetaraĵoj en la nutraĵvendejoj. Kelkaj miris pro la nekutima dieto. Aliaj moke ridis. Mia patro foje diris: "Mi deziru, ke ĉiuj bestoj, kiujn mi ne formanĝis, estontece iru en vico al mia tombo."



Interrete mi trovis la jenan:

En la 60a kaj la 70a jardekoj oni favoris vegetaran manĝon kaj vojaĝoj al Hindio estis popularaj.



Jam inter la iamaj grekoj troviĝis vegetaranoj, ekz. Pythagoras dum la 6a jarcento antaŭ Kristo. En Hindio la vegetarismo havis ligilon al la religioj.

Dum la 17a kaj la 18a jarcentoj en Svedio kelkaj estis inspiritaj al vegetarismo pro bestprotektaj kialoj. En Anglio la *Vegetarian Society* estis fondita en 1847.

En Svedio la kuracisto Fredrik Melander eldonis vegetaran kuirlibron en 1876.

Nuntempe oni emas motivigi vegetaran vivstilon per la protekto de la medio.

Mi ĵus finlegis la sciencfikciajn novelojn "Sur bluaj planedoj" de Laure Patas d'Illiers. La verkistino moviĝas tempe kaj geografie. En la ĉapitro "Ordinara tagmanĝo" ŝi rakontas pri imagita estonteco.

*Avino diras: "Manĝu vian ĵeleon el planktono!" La nepino ne volis. Avino: "Tre bongustas, mi elektis ĵeleon aromigitan je oranĝo kaj ene estas proteinoj. Vi bezonas proteinojn por kreski [...] Sciu, planktono devenas de la oceano, ĝi estas aro da tre etaj bestoj, tiel malgrandaj, ke vi ne povas vidi ilin." La nepino: "Kial oni manĝas bestojn?" Avino: "Ĉar ili enhavas proteinojn kaj ni bezonas tion. En la malnova tempo, oni manĝis ĉiajn bestojn. Nun ne plu estas bestoj, krom la mara planktono". Nevino: "Antaŭe, ĉu oni manĝis bestojn kiel Jiji (ŝia ludilo, pluŝa urso)? [...] Antaŭe, ĉu oni manĝis dinosaŭrojn?" Avino: "Ne, ili jam estis malaperintaj." /Siv*

## Ĉu la anglaparolantoj fariĝas viktimoj de la disvastiĝo de sia lingvo? (La internaciigo de la angla kiel venĝo al anglaparolantoj.)

de Riksablo



*“Vi trudis ĝin al ni; do nun ĝi ne estas via.”*

**Mi estas brito**, naskita en Britio, loĝanta en Britio. Mi ŝatas mian denaskan lingvon. Kial mi taksas ĝin malbona ilo por tutmonda interkomunikado? Multe da homoj kun aliaj denaskaj lingvoj pasive akceptas, ke oni devas lerni la anglan por progreso en edukado, komerco ktp. Krome, multe da anglaparolantoj ŝajne opinias, ke tiu estas feliĉa stato, nur avantaĝo por ili. Eble, ili ne intencas lerni alian lingvon, do ne ĝenas ilin la fakto, ke se angloparolanto ekster la hejmlando provas diri ion alilingve, plejofte la aŭdanto kaptos la ŝancon por praktiki sian scipovon de la angla, kaj respondos angle. Nu, tio ĉagrenetas sed apenaŭ estas grandega problemo; ekzistas pli gravaj problemoj.

Preskaŭ ĉiu konstatas, ke uzado de la angla (aŭ alia nacia lingvo) kiel internacia lingvo nepre enkondukas iom da malegaleco; multaj homoj ankaŭ konstatas, ke tia situacio povas vole-nevole enkonduki multe da malplaĉaj miskomprenoj; sed tre malmultaj konstatas,

ke tio trudas pezajn malfacilaĵojn al la anglaparolantoj en tiaj interparoladoj. Oni pensas, ke la anglaparolanto havas superan, do pli agrablan, pozicion en tia interagado. Tute ne necesas.

Dum du jaroj mi laboris en Eŭropunia esplora projekto. La laborlingvo estis la angla. Tio estis dolora sperto! Mi ade miskomprenis la provojn je komunikado de la kunlaborantoj, aŭ igis miskomprenojn inter ili, ĉar mi multfoje forgesis, ke ili fakte uzis alian lingvon ol mi (ja fremdan lingvon, kiu false ŝajnis sin mia propra!). Ne ĉiam temis pri bagatelaj nuancoj; ofte temis pri gravaj signifoj. Krome, ilia frazfarado kelkfoje ŝajnis al mi, kiel venĝo al miaj samlingvanoj, rekompence pro trudadi alilingvanojn uzi mian lingvon. Tiom da malbelaĵoj sturmas la orelojn! – elbuŝitaj (kaj, speciale, skribitaj en dokumentoj oficialaj) sen iu ajn sento de la estetiko de lingvo, kiu povas esti bele esprima ilo!



En la rolo de la angla kiel "globa lingvo" oni trovas specon de venĝo por la multaj pekoj de la brit-usona imperiismo! Mi naskiĝis post

la plejparto da tiuj pekoj, kaj ne volas pagi prezon por ili...

/Riksablo

## La angla estas ja dise parolata

La angla estas mondlingvo en maniero kiel neniu alia lingvo iam estis antaŭe en la historio. Kvankam la latina estis uzata kiel internacia lingvo dum la Mezepoko, ĝi estis uzata nur en Eŭropo.

La angla estas uzata hodiaŭ en ĉiuj kontinentoj kaj en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo. La tri rondoj foje estas menciitaj:

La interna rondo, kiu inkluzivas ĉirkaŭ 400 milionojn da homoj, estas la landoj, kie la angla lingvo estas parolata kiel unua kaj ofte nura lingvo. Ĉi tiuj estas ĉefe Usono, Britio, Kanado, Aŭstralio kaj Nov-Zelando.

La meza rondo, kiu inkluzivas ĝis 500 milionojn da homoj, ĉefe en Afriko kaj Azio, estas la landoj kie la angla estas pli-malpli oficiala dua lingvo. Ĝi povas ekz. estu lerneja lingvo, kortega lingvo, komerca lingvo aŭ la sola lingvo en kiu homoj el diversaj partoj de la sama lando povas komuniki.

La tria rondo estas la rolo de la angla kiel "lingvon frankan", ankaŭ konata kiel pontolingvo por ebligi komunikadon inter homoj kun malsamaj gepatraj lingvoj.



Tamen ni bezonas alian mondan lingvon, kiu ne favoras iun landon, lingvo, kiu estas logika, nuanca kaj relative facile lernebla. Nur planita lingvo plenumas ĉi tiujn kriteriojn. Do, ni plustrebu por la evoluo de Esperanto. Entute troviĝas en Eŭropo tri oficialaj alfabetoj: la latina, la kirila kaj la greka. Kiam "la tuta mondo" jam lernis la latinan alfabeton per la angla, verŝajne estos pli facile akcepti Esperanton.

Poste nur restos la problemo pri la ĉapelitaj literoj, sed tion oni nur rigardas infana malsano 😊

/Siv



## La 6:a de februaro estas la samea nacia tago


El la paĝo de Sten Johansson, Facebook.

Sameoj estas la origina popolo de la nordaj partoj de Norvegio, Svedio, Finnlando kaj nordokcidente en Rusio. La flago estis agnoskita en 1986.



# Mapo pri koloniistoj kaj kolonioj dum jarcentoj

Donald Kasper, iama ĵurnalisto en Hongkongo, foje vizitis la gotenburĝan klubon. La mapo venas de lia Facebook-paĝo.



La eŭropa koloniismo komenciĝis jam dum la 15a jarcento. Ankaŭ Svedio iam estis koloniisma lando dum kelkaj jaroj. Ni ne batalis, sed aĉetis koloniojn.

## Svenska kolonier – Svedaj kolonioj

Svedaj kolonioj konsistis el kvin havaĵoj, el kiuj kvar estas mallongdaŭraj: Nova Svedio (1638–1655), Cabo Corso (1638–1655), Saint-Barthélemy, (1785–1878) Gvadelupo kaj Porto-Novo. Tiuj kolonioj situis en Nordameriko, Afriko kaj Azio.

Nova Svedio estis la nomo de la kolonio kiu estis fondita en Nordameriko en 1638 kaj kiu estis sveda dum dek sep jaroj. La kolonio situis kie hodiaŭ estas la ŝtatoj de Delavaro, Pensilvanio kaj Nov-Ĵerzejo.

En la komenco de 1637 venis la germana Peter Minuit, kiu estis guberniestro de la kolonio de la nederlanda-kariba firmao "Nova Nederlando" al Svedio. Li prezentis proponon pri la establado de kolonio ĉe la rivero Delavaro en Nordameriko. Post kiam la registaro donis sian konsenton, kapitalo estis kolektita, duono venis de Svedio kaj la alia duono de Nederlando, post kio komercentreprene nomita Söderkompaniet (pli posta Nya Sverigekompaniet) estis formita. La celo de la firmao estis ĉefe alporti tabakon kaj besthaŭtojn al Svedio.

Du ŝipoj, Kalmar Nyckel kaj Fågel Grip, kun miksita skipo de svedoj kaj nederlandanoj forlasis la havenon de Göteborg en

novembro 1637 kun Peter Minuit kiel komandanto. La ŝipoj alvenis en Delavara Bay en marto de la sekva jaro. Minuit tuj



*Nya Sverige – Nova Svedio laŭ la rivero Delaware.*

komencis intertraktadojn kun la indianoj por teraĉetoj kaj la 29-an de marto li kompletigis la unuan aĉeton, kiu inkludis pecon de la dekstra bordo de la rivero de la enfluejo de la rivero ĝis la alfluanto Schuylkill – sed sen limreguligo enlanden. Kiel centro por la estonta koloniado Minuit konstruis fortikaĵon kun kelkaj lignaj domoj, kiu estis nomita "Fort Christina" laŭ la tiama reĝino de Svedio Kristina.

Rilatoj kun la indianoj estis ĝenerale bonaj, malgraŭ kelkaj negravaj malbonŝancoj. La vilaĝoj de la delavaro-indianoj kuŝis laŭlonge de la rivero kaj kun ili la svedoj interŝanĝis maizon kaj aliajn manĝaĵojn kaj rekompence la indianoj ricevis potojn, tukojn kaj ornamaĵojn. De la Susquehanna-indianoj, kiuj havis siajn ĉaskampojn enlande, ili interŝanĝis felojn inter si.

Kun la nederlandanoj kaj la angloj, kiuj ankaŭ havis koloniojn proksime, tamen konfliktoj ekestis preskaŭ de la komenco.

Dum la unuaj du jaroj, Nova Svedio havis plejparte la karakteron de komercstacio kun kunlaborantaro de proksimume dudek soldatoj, interpretisto kaj komisaro. Ili verŝajne havis sufiĉe monotonan kaj enuigan vivon atendante la venontan ŝipon, kiu alvenos el Svedio. Daŭris ĝis la fino de 1640 ke nova ŝipo revenis al Nova Svedio kaj inkludis novan guberniestron, Peter Holländer Ridder. Kavaliro aĉetis eĉ pli da tero de la indianoj.

En februaro 1643, la venonta ekspedicio venis al Nova Svedio kaj inkludis novan guberniestron, Johan Printz. Li estis celkonscia sinjoro kaj konstruis la kolonion kaj granda kaj altvalora. Li konstruis plurajn fortikaĵojn kaj blokdomojn kiel ekzemple New Elfsborg, New Gothenburg, New Vaasa, Mölndal kaj Upland kaj kelkajn aliajn fortikaĵojn kaj komercstaciojn. Kun la teraĉetoj faritaj fare de Minuit, Ridder kaj Printz, Nova Svedio kovris la tutan okcidentan

flankon de delavaro de Cape Henlopen sur la marbordo ĝis la nuna Trenton, kaj sur la orienta flanko, inkluzive de la areo ĉirkaŭ New Elfsborg – totalo de proksimume 200 svedajn mejlojn longa. Tamen, la svedaj kaj finnaj kolonianoj estis tro malmultaj por povi loĝatigi tiun tutan areon kiam ili estis en disaj kompromisoj ĉie en la areo.

De Svedio estis malfacile konservi la kolonion kun liveraĵoj kaj kiam unu el la svedaj ŝipoj "Kattan" sinkis, ĝi komencis malprosperi.

La nederlanda guberniestro, Peter Stuyvesant, akiris kreskantan avantaĝon kaj ekonomie kaj milite. Kiam la kolonianoj ribelis kontraŭ Printz, kiu laŭ ili tro malmilde regis, Printz laciĝis kaj iris hejmen. Antaŭ la foriro, li nomumis sian bofraton, Johan Papegoja, kiel sian deputiton. La regado de Printz (1643–1653) daŭre estas konsiderata la glortempo de la kolonio.

Antaŭ ol Printz revenis hejmen, nova ekspedicio (la 9-a) jam forlasis Svedion kun nova guberniestro, Johan Risingh. La ŝipo kun kiu li vojaĝis estis nomita Örnen kaj iom da tempo poste la pli malgranda ŝipo "Gyllene Hajen" foriris. Tamen, ĉi-lastaj ŝipo estis kaperita fare de la nederlandanoj ĉe la alveno ĉar ili hazarde velis en Manhatanon. Kiam la ŝipo Örnen alvenis, post malfacila mariro, la svedoj konkeris la ĵuskonstruitan fortikaĵon de la nederlanda "Casimir", sen eĉ unu pafo. La fortikaĵo estis renomita "Fort Trinity". La kolonio reorganiziĝis kaj por tempo Nova Svedio prosperis. Tamen, la nederlandanoj volis ĉesiigi la ĉeeston de la svedoj ĉe Delavaro kaj tial venis aro de sep ŝipoj plene ekipitaj per soldatoj kaj militmaterialo. En septembro 1655, Christina baldaŭ estis sieĝita kaj Rising devis prizigni la fortikaĵon post tempeto. Li revenis al Svedio kun kelkaj el siaj homoj. Dum la nederlanda transpreno, Nova Svedio konsistis el proksimume 400 homoj. La tempo de Nova Svedio estis tiel finita. Svedio provis plurajn fojojn tra



diplomatiaj kanaloj rehavi Novan Svedion. Tio neniam sukcesis. Naŭ jarojn poste (1664) la areo estis konkerita fare de la angloj. Entute dek unu ekspedicioj estis senditaj al Nova Svedio. Ĉi-lastaj alvenis baldaŭ post kiam la nederlandanoj transprenis la kolonion. Malgraŭ tio, ke ne plu estis la svedoj kiuj regis la areon, multaj svedoj volis enmigri tien. Jam en 1664 alvenis ŝipo kun finnaj familioj el Medelpad kaj svedaj pastroj estis senditaj tien dum la jaroj 1696–1783 por prizorgi la kongregaciojn fonditajn de la kolonianoj. Inter la pastroj menciblas Johannes Jonæ Holmiensis Campanius kiu en la jaroj 1642–1648 estis garnizona pastro ĉe la fortikaĵo 'Nov-Gotenburgo' kaj misiisto inter la indianoj. La pastroj estis senditaj al Nova

FONTOJ:

Gazeto: Populär Historia n-ro 4/94

Retejo: runeberg.org » New Sweden, » Barthélemy

Svedio ĝis la loĝantaro ne plu komprenis la svedan lingvon.



David E. Lewis vestita kiel Johan Printz. La bildo estis prezentita en *Swedish Colonial News* en la aŭtuno de 2004.

## La Sveda Placo en Vieno

Renate kaj Walter KLAG, Vieno

La Sveda Placo en la unua distrikto de Vieno (Schwedenplatz [ŝvédénplac]) havas sian nomon ekde 1919. Tiam, post la Unua Mondmilito (1914–1918) regis malsato en Vieno, kaj la sveda ŝtato sendis grandaniman helpon en la formo de nutraĵoj. Por danki al Svedio, la iama Ferdinand-Placo ricevis la nomon Schwedenplatz.

Plii "Sveda Nutrado" okazis 1946 ĝis 1949. 70 mil aŭstraj infanoj tri- ĝis sesjaraĝaj, el tiuj 60 mil en Vieno, ricevis nutraĵojn el Svedio.

Hodiaŭ Sveda Placo estas grava trafiknodo de du metrolinioj kaj kelkaj tram- kaj buslinioj. La

proksima Schwedenbrücke (Sveda Ponto) transiras la Danuban Kanalon.

Vieno havas malnovan kaj tre ampleksan tramreton, kiu daŭre kreskas. 2020 plilongiĝis la tramlinio O (litero O, ne nul) en novan kvartalon en la 2a distrikto, kie iam estis



Finhaltejo de la tramlinio O "Bruno Marek-Allee". Tiu aleo ricevis sian nomon por la memoro al la socialdemokrata Viena urbestro Marek (1900–1991).

granda fervoja varstacio, nun areo por multaj loĝdomoj. Inter la novaj trakoj de la tramlinio oni ne pavimis ŝtonojn, sed plantis herbejon (nun, en januaro 2022, kovrita de neĝo). Tiu verdaĵo retenas la pluvakvon kaj malvarmigas la lokan klimaton en somero.



Tramlinio 1 sur Schwedenplatz.



Ŝildo Schwedenplatz.

## Letero de la aŭstro, Walter Klag, leginte artikolon el "Die Presse" pri koronaj strategioj, i.a. en Svedio



Die Presse estas aŭstra liberal-konservativa ĉiutaga gazeto kun sidejo en Vieno. La gazeto unue estis publikigita la 3-an de julio 1848 kiel *Die Presse*. La gazeto estis ĉesigita en 1896. [...] La publikigo estis rekomencita en 1946 sub la nomo *Die Presse*. Hodiaŭ, la revuo estas parto de Styria Media Group kaj havas 296 000 ĉiutagajn legantojn.

**Artikolo pri kovimo en "Die Presse" komence de januaro 2022. De tiu tempo la situacio povas esti ŝanĝita, sed tamen estas interese legi pri la diversaj voj-elektoj. Post la artikolo venas leteron de Walter Klag al la redakcio de Die Presse. Interese legi pri liaj pensoj pri la sveda vojo. En ligilo li montras la statistikon pri la "sveda vojo".**

### 1. ĈEFARTIKOLO – La ĝusta korona strategio estas filino de la tempo

Omikron ŝanĝas la manieron kiel ni traktas koronajn infektojn tutmonde. Ĉi tio ankaŭ verŝas novan lumon sur la vojojn, kiujn Svedio kaj Ĉinio prenis.

De ĉi-semajne, kun la komenco ke la lernejo komenciĝas ankaŭ en Aŭstrio por realkontrolo por la nova korona strategio de la federacia registaro.

Ĉar kvankam la argumento estas ĝusta, ke infanoj estas regule testataj en lernejoj kaj tiel estas bona superrigardo de la infekta situacio, la reveno de la vivo al normalaj operacioj

### 1. LEITARTIKEL – Die richtige onastrategie ist eine Tochter der Zeit

Omikron verändert weltweit den Umgang mit Corona-Infektionen. Das wirft auch ein neues Licht auf jene Wege, die Schweden und China gegangen sind.

Ab dieser Woche kommt es mit dem Schulbeginn auch in Österreich zum Realitäts-Check für die neue Coronastrategie der Bundesregierung. Denn obwohl das Argument stimmt, dass Kinder in den Schulen regelmäßig getestet werden und es somit einen guten Überblick über die Infektionslage gibt, wird die Rückkehr des Lebens in den Normalbetrieb zu einer Verstärkung der sozialen Kontakte und damit der Infektionen führen.

kondukos al pliigo de sociaj kontaktoj kaj do de infektoj.

Malgraŭ la pli rapide disvastiĝanta omikron-varianto, homoj en ĉi tiu lando nun fidis je "kontrolita infekto".

Aliro por kiu estas kompreneblaj kialoj. Omikron estas pli infekta, sed malpli danĝera ol la delta varianto, kiu alportis al Aŭstrio sian kvaran blokadon aŭtune. Scenaro, kiun politikistoj nun absolute volas eviti.

Samtempe, la ŝanĝo de strategio ankaŭ havas riskojn. Omikron daŭre prezentas altan riskon por nevakcinitaj homoj finiĝi en intenskuracado aŭ mortado.

La nuna situacio estas do aparte tragika por tiuj homoj, kies korpoj ne disvolvas protekton malgraŭ esti vakcinitaj. Estas kompreneble, ke ili havas la senton esti "forlasitaj en la pluvo."

Samtempe, la alternativo – renovigitaj amasaj limigoj por la ĝenerala publiko – ne plu estas realigebla laŭ socia kaj ekonomia politiko.

Por multaj homoj, la sento lastatempe disvastiĝis kvazaŭ la malhavaj de la pasintaj du jaroj estus vanaj, se ĉiu ajn estas infektita iam ajn.

Sed tio ne estas vera. Trakti la pandemion estas tre proksime ligita al la specifaj cirkonstancoj. Kaj ĉi tiuj ŝanĝiĝis laŭlonge de la tempo (precipe ekde Omikron). Tion montras ankaŭ rigardo al landoj, kiuj prenis malsamajn vojojn.

**Svedio estas ekzemplo de tio. Ĝuste de la komenco, la skandinavoj fidis ĉefe je rekomendoj kaj malpli je registaraj regularoj kiel ekzemple fermo de butikoj aŭ lernejoj. En la komenco, la mortokvanto pafiĝis tiel rapide, tial Svedio estis amase kritikita.**

**Intertempe, tamen, la bildo ŝanĝiĝis. Do la kvara ondo ne realiĝis. Kaj ekde Kristnasko, la relativa nombro da koronaj mortoj estis pli alta en Aŭstrio ol en Svedio.**

Por multaj homoj, la sento lastatempe disvastiĝis kvazaŭ la malhavaĵoj de la pasintaj

Trotz der sich schneller ausbreitenden Omikron-Variante setzt man auch hierzulande nun auf "kontrollierte Ansteckung".

Eine Vorgangsweise, für die es nachvollziehbare Gründe gibt. So ist Omikron zwar infektiöser, aber weniger gefährlich als die Deltavariante, die Österreich im Herbst den vierten Lockdown bescherte. Ein Szenario, das die Politik nun unbedingt vermeiden möchte.

Gleichzeitig hat die Strategieänderung auch Risiken. So birgt Omikron für Ungeimpfte nach wie vor eine hohe Gefahr, auf der Intensivstation zu enden oder zu sterben.

Besonders tragisch ist die aktuelle Situation daher für jene Menschen, deren Körper trotz Impfung keinen Schutz aufbauen. Dass bei diesen das Gefühl entsteht, im Regen stehen gelassen zu werden, ist verständlich. Gleichzeitig ist die Alternative – erneute massive Einschränkungen für die Allgemeinheit – gesellschafts- und wirtschaftspolitisch nicht mehr umsetzbar.

Bei vielen Menschen machte sich zuletzt daher das Gefühl breit, als ob die Entbehungen der vergangenen zwei Jahre umsonst gewesen sein, wenn nun ohnehin jeder irgendwann infiziert wird.

Doch das stimmt nicht. So ist der Umgang mit der Pandemie sehr stark mit den konkreten Gegebenheiten verknüpft. Und diese haben sich im Lauf der Zeit (vor allem seit Omikron) verändert. Das zeigt auch ein Blick auf Länder, die Sonderwege gegangen sind.

**Ein Beispiel dafür ist Schweden. Die Skandinavier setzten von Anfang an vor allem auf Empfehlungen und weniger auf staatliche Verordnungen wie das Schließen von Geschäften oder Schulen. Anfangs schossen die Todeszahlen deswegen rasant nach oben, weshalb Schweden massiv kritisiert wurde.**

**Inzwischen hat sich das Bild jedoch gewandelt. So blieb die vierte Welle de facto aus. Und seit Weihnachten ist auch die relative Zahl der Coronatoten in Österreich höher als in Schweden.**

du jaroj estus vanaj, se ĉiu ajn estas infektita iam ajn.

Sed tio ne estas vera. Trakti la pandemion estas tre proksime ligita al la specifaj cirkonstancoj.

Kaj ĉi tiuj ŝanĝiĝis laŭlonge de la tempo (precipe ekde Omikron).

**Tion montras ankaŭ rigardo al landoj, kiuj prenis malsamajn vojojn.**

**Svedio estas ekzemplo de tio. De la komenco, la skandinavoj fidis ĉefe je rekomendoj kaj malpli je registaraj regularoj kiel fermo de butikoj aŭ lernejoj.**

**Kompreneble, estas tro frue por laŭdi la svedan manieron. Unuflanke, la lando havas la geografian avantaĝon esti maldense loĝata kaj daŭre estas malantaŭe kompare kun siaj skandinavaj najbaroj. Krome, la kazoj de Omikron nuntempe rapide altiĝas. Sed Svedio apenaŭ havas agresemajn kontraŭulojn kaj la regulo 1-G enkondukita en decembro por pli grandaj endomaj eventoj estis akceptita senhezite.**

En la komenco, la mortokvanto pafiĝis tiel rapide, tial Svedio estis amase kritikita. Intertempe, tamen, la bildo ŝanĝiĝis. Do la kvara ondo ne realiĝis. Kaj ekde Kristnasko, la relativa nombro da koronaj mortoj estis pli alta en Aŭstrio ol en Svedio.

Alia ekzemplo de speciala itinero estas Ĉinio. En la devenlando de la korona viruso, rigida nul-kovid-strategio estis adoptita post la kaoso en Wuhan. Kelkaj kazoj sufiĉis por fermi urbojn aŭ gravajn marhavenojn dum semajnoj. La sukceso pruvis al Ĉinio prave. Ne estis dua, tria aŭ kvara ondo.

Ekde Omikron, ĉi tiu strategio ne plu ŝajnas esti tenebla. La lando ankoraŭ rezistas ĝin per ĉiuj fortoj kaj akceptas altan flankan damaĝon. Fakuloj atendas, ke ne ĉesos grandan ondon de omikronoj en Ĉinio meztempe.

Tio estus grandega embaraso ne nur por la registaro en Pekino, kiu ŝatis rilati al la "nekompetenta politiko" en la Okcidento.

